

LABORISTA SPORTASOCIO
DE FINNLANDO

*

PROGRAMO

DE
UNUA ASOCIA FESTO

16-19. 6. 27



HELSINKI 1927

A80-10663

LABORISTA SPORTASOCIO DE FINNLANDO

PROGRAMO
DE
UNUA ASOCIA FESTO
OKAZONTA EN HELSINKI
LA 16-19 DE JUNIO
1927



Helsinki
Työväen Urheiluliitto

REGISTRO DE LA ENHAVO.

	Pago
Invito	3
Partopreno	5
Konkurreguloj	5
Anonciĝo	5
Festinsigno	6
Festlibro	6
Loĝigo	6
Vojaĝelspezoj	6
Premioj	6
Ĝenerala programo	7
Konkurlokoj	8
Festa procesio	8
Komuna gimnastiko	9
Gimnastikaj konkuroj	9
Konkuro pri standardoj	9
por virinoj	9
por viroj	10
Plurluktoj	11
Kritiko de gimnastiko	11
Junularaj gimnastikkonkuroj	12
Konkuroj en droma sporto	12
Plenumordo de droma sporto	14
Naĝkonkuroj	15
Plenumordo de naĝkonkuroj	15
Luktokonkuroj	16
Boksokonkuroj	16
Ciklokonkuroj	16
Ludoj	16

ESTIMATA ASOCIO!

Ni invitas vin partopreni en la unua asocia festo de Laborista Sportasocio de Finnlando okazonta en Helsinki la 16—19 de junio 1927.

LA ESTRARO DE LABORISTA SPORTASOCIO
DE FINNLANDO

Eino Ruuska. S. A. Pulli.

Prezidanto


Sekretario

LA ĈEFA KOMITATO DE LA ASOCIA FESTO DE
LABORISTA SPORTASOCIO DE FINNLANDO

Jänis Mikkelo V. J. Korttainen.

Prezidanto

Sekretario



A80-1066

ĜENERALAJ DIFINOJ.

1. PARTOPRENO.

En la festo rajtas partopreni

1) membroj de la sekcioj de Socialista Laborista Sportinternacio LSI kaj la anoj de Ruĝa Sportinternacio RSI laŭ la decido de Pariza kongreso,

2) laboristaj sportuloj per rekomendo de iu laborista centra organizacio de koncerna lando el landoj, kiuj ankoraŭ ne havas laboristan sportasocion apartenantan nek al unu nek al alia laborista sportinternacio,

3) la anoj de organizita gejunularo kaj la gejunuloj de ambaŭ laboristaj abstinecaj asocioj de Finnlando al la festa procesio kaj al la komuna gimnastika prezentado de gejunuloj.

2. KONKURREGULOJ.

La konkuroj okazos laŭ la reguloj de Laborista Sportasocio de Finnlando. Tamen la lukto- kaj la boksokonkuroj okazos laŭ la internaciaj reguloj. La reguloj de droma sporto malsamas je la internaciaj reguloj nur en kelkaj malgravaj paragrafoj.

3. ANONCIĜO AL LA FESTO.

1) Antaŭanonco devas esti farota antaŭ la unua de majo. Ĝi devas enhavi informon pri la nombro de partoprenontoj kaj pri la fakoj al kiuj ili partoprenos.

Nur al partoprenontoj anoncigitaj ĝis la unua de majo oni garantias loĝigon.

2) Definitiva anoncigo devas esti farata per specialaj formularoj aparte por ĉiu fako antaŭ la unua de junio.

Pli poste faritaj anoncigoj ne estos konsiderataj.

Adreso por la anoncigoj estas jena: *Helsinki, Sirkuskatu 5.*
Teknika komitato de Ia asocia festo de TUL.

4. FESTINSIGNO KAJ FESTLIBRO.

Por la partoprenontoj oni pretigas specialan festinsignon kaj festlibron, por kiuj oni enkasigas 10 Fmk.

Partoprenontoj sub 16 jaroj estas liberaj de tiu pago.

5. LOĜIGO.

Por la partoprenontoj estas rezervotaj komunaj loĝejoj, pro kio ĉiu partoprenonto devas kunpreni litkovrilon, kusenon kaj tolaĵojn.

Por loĝigo oni enkasigas 25 Fmk. po ĉiu loĝigota persono kaj la tuta festa tempo.

Partoprenontojn sub 16 jaroj oni loĝigos senpage.

Por ricevi la loĝigorajton ĉiu partoprenonto devas plenumigi kaj resendi la loĝigan formularon.

6. VOJAĜELSPEZOJ.

La aranĝanta asocio pagas neniajn vojaĝelspezojn de partoprenontoj.

Ĉiuj partoprenontoj ricevos 50 % rabaton de biletprezoj sur la fervojoj de Finnlanda ŝtato. Por ricevi la rabaton ĉiu partoprenonto stampigu sian bileton ĉe la landlima haltejo kaj konservu ĝin por la reveturo. Per la atesto ricevota de la oficejo de la festo kaj per la konservita bileto oni rajtas reveturi senpage.

La rabato estas valida de la 11 ĝis la 25 de junio.

7. LA PREMIOJ.

Kiel premioj oni disdonas diplomojn.

8. LA ŜANĜORAJTO DE PROGRAMO.

La aranĝanto rezervas al si la rajton por eventualaj ŝanĝoj de la programo.

9. SPECIALAJ INSTRUKCIOJ.

Krom ĉi tiuj reguloj ĉiu partoprenonto devas priatenti la specialajn instrukciojn donotajn je la asocia festo.

ĜENERALA PROGRAMO.

Ĵaŭdon la 16. de junio:

je la 20 malferma festo.

Vendredon la 17. de junio:

je la	8	— 9	ekzercado en komuna gimnastiko por viroj,
» »	8.30	— 10.30	ekzercado en komuna gimnastiko por virinoj,
» »	10	— 11.30	ekzercado en komuna gimnastiko por gejunuloj,
» »	11	— 14	konkuroj en droma sporto,
» »	13	— 17	konkuro pri standardoj por viroj,
» »	13	— 19	» » » » virinoj,
» »	13	— 17	trupaj konkuroj en gimnastiko por gejunuloj,
» »	15	— 17	naĝkonkuroj,
» »	17	— 19.30	konkuroj en droma sporto kaj en ciklado,
» »	18	—	luktokonkuroj,
» »	18	—	boksokonkuroj,
» »	19	—	konkuroj en limpilko por virinoj,
» »	19	— 21	konkuroj en ilara gimnastiko por viroj,
» »	20	—	pedpilka konkuro interlanda.

Sabaton la 18. de junio:

je la	7.30	— 9	ekzercado en komuna gimnastiko por virinoj,
» »	9	— 10	ekzercado en komuna gimnastiko por viroj,
» »	10	— 11	ekzercado en komuna gimnastiko por gejunuloj,
» »	11	— 14	sistemkonkuro inter diversaj gimnastik-sistemoj,
» »	11	— 14	konkuroj en droma sporto kaj en ciklado,
» »	14	—	naĝkonkuroj,
» »	14	—	luktokonkuroj,
» »	14	—	boksokonkuroj,
» »	14	— 16	konkuroj pri standardoj por virinoj,
» »	14	— 16	» » » » viroj,

- je la 16 —18.30 konkuroj en ilara gimnastiko por viroj,
 » » 17 —19.30 konkuroj en droma sporto,
 » » 19 — konkuroj en limpilko por virinoj,
 » » 20 —22 piedpilka konkuro interlanda.

Dimanĉon la 19. de junio:

- je la 10.30— la partoprenantoj kolektiĝas ĉe la sportdromo Kallio kaj en la parko Kaivopuisto p r ordigi sin al la festa procesio,
 » » 11.30— la festprocesioj ekmarŝas el sportdromo Kallio kaj el Kaivopuisto al la festa dromo Pallokenttä, post alveno tien
 » » 13.15— komuna gimnastika prezentado de virinoj,
 » » 14 — » » » » viroj,
 » » 14.45— » » » » gejunuloj,
 » » 15.30—16 prezentadoj en diversaj ludoj,
 » » 16 — interregiona konkuro ĉirkaŭ Helsinki,
 » » 16 — piedpilka finkonkuro interlanda,
 » » 20 — ferma festo.

KONKURLOKOJ.

Konkuroj en droma sporto, ekveturo kaj alveno de cikla konkuro kaj la limpilka konkuro por virinoj okazos en la sportdromo Eläintarha, naĝkonkuroj okazos en naĝejo Humallahti kaj ĉiuj aliaj konkuroj kaj prezentadoj en la festa dromo Pallokenttä.

FESTA PROCESIO.

Ĉiu festpartoprenanto devas partopreni en la festa procesio. La festa procesio estas ordigota laŭ distriktoj laŭ loto.

Ĉiu distrikto ordigos sin en la festprocesion laŭ societoj laŭ alfabeto.

Kiel unua en la procesio marŝas la estraro de la asocio kun la standardo, poste la eksterlandaj partoprenantoj kaj post ili enlandaj partoprenantoj.

Antaŭ ĉiu distrikto oni portas ŝildon kun la nomo de distrikto

kaj antaŭ ĉiu societo la standardon aŭ ŝildon kun la nomo de societo.

Por la festa procesio oni vestigu sin per gimnastika aŭ sporta vesto.

KOMUNA GIMNASTIKO.

Virinoj.

La gimnastikprogramo kun notoj estas publikigita en virina sportjurnalo n:o 10, 1926.

Vesto: griza kitelvesto sen ŝtrumpoj kaj sen kapvesto, se eble kun haŭtkoloraj sandaloj aŭ sen piedvesto.

Viroj.

La gimnastikprogramo estas publikigita en speciala kajero.

Vesto: blanka, trikota ĉemizo, longaj pantalonoj kun ruĝa zono kaj se eble blankaj gimnastikŝuoj.

Knabinoj kaj knaboj.

La gimnastikprogramo estas publikigita en gejunula ĵurnalo Nouseva Voima en decembro 1926.

Vesto: knabinoj, samspeca griza kitelvesto kiel ĉe virinoj, sed sen ŝuoj. Knaboj, blanka longmanika ĉemizo kun larĝa kolumo aŭ blanka trikota ĉemizo kaj blankaj sportpantalonetoj sen ŝuoj.


GIMNASTIKAJ KONKUROJ.

Virinoj.

Konkuro pri standardoj por TUL trupoj.

Oni konkuras pri la standardoj donacitaj de laborista sportjurnalo en la serioj A kaj B. En la serio A konkuras la trupoj, kiuj plenumas la levmovon kaj nedevigan salton per iloj kaj en la serio B la trupoj, kiuj plenumas nur libergimnastikan programon.

Ĉiu konkuranta trupo difinas mem sian programon, sed tamen ĝi devas enhavi jenajn movojn: orda movo, movoj por la kapo, manoj, kaj kruroj, fleksado flanken, antaŭen kaj posten, sving-salto, lev- kaj ekvilibras movoj, skapola movo, ventromovoj,



rotacia movo de trunko, nedevisa salto, paŝospeco, iro kaj kuro. Movfamiliojn oni rajtas kunmeti, sed oni devas informi pri tio en la skriba programo sendota al la virina komitato de TUL antaŭ unu monato de la festo. Samtempe oni devas informi, en kiu el la du serioj la trupo konkuras.

Oni rajtas plenumi la konkurprogramon aŭ laŭ komando aŭ laŭ muziko, sed la programon oni kritikis samvalora. La kapelon oni rezervas laŭ peto.

Ĉiu societo rajtas konkuri per laŭvole multaj trupoj, sed ĉiu trupo devas konsisti minimume el 8 gimnastinoj. La sama gimnastino rajtas konkuri nur en unu trupo, sed la sama gvidanto, kiu devas esti ano de la asocio, rajtas gvidi plurajn trupojn.

Kritiko. Oni donas pri la kunmeto, pri la sana, la beleca kaj malfacileca valoro de la programo 1—10, pri plenumo 1—20, pri sintenado kaj pri ĝenerala efiko 1—10 plenajn poentojn. Ĉiu movo estas kritikota aparte.

Viroj.

Konkuro pri standardoj por TUL trupoj.

Oni konkuras pri la standardoj donacitaj de laborista sport-jurnalo en du serioj: a) en liber- kaj en bastonmovoj kaj b) en ilarmovoj.

1. Kamparaj societoj: a) en liber- aŭ bastonmovoj por 7-viraj trupoj, b) en ilarmovoj, kiujn oni plenumas kune kun la internacia 6-lukto, 5 ilarmovoj por 5-viraj trupoj.

2. Urbaj societoj: a) en liber- aŭ en bastonmovoj por 9-viraj trupoj, b) en ilarmovoj, kiujn oni plenumas kune kun la internacia 6-lukto, 5 ilarmovoj por 7-viraj trupoj.

La trupoj povas esti ankaŭ pli grandaj ol la difinita nombro kaj oni povas ankaŭ konkuri nur en ilarmovoj. Liber-kaj bastonmovoj estas alternativaj, do ke oni povas elekti aŭ unun aŭ alian aŭ kunmeti ambaŭ movojn en unu programon. Tempon oni rajtas uzi por elmonro maksimume 25 minutojn.

Internacia 6-lukto.

Konkurspecoj: serio da liberaj movoj kontinue plenumotaj,

movo sur la ĉevalo, sur la stango kaj sur la baraletoj, salto sur la ĉevalo kaj sur la kapro. Ĉiuj movoj estas nedevigaj. Ĉe la saltoj ne necesas tuŝi la ilon. La ripojn de ĉevalo oni ne rajtas forpreni. En la saltoj oni rajtas uzi risortan aŭ senrisortan salttabulon aŭ salti sen iu tabulo. La konkuro estas individua kaj la nombro de partoprenantoj nelimigita.

Interlanda 6-lukto.

Laŭ la rezultoj de internacia 6-lukto oni difinas la rangon de la landoj sumigante la poentojn de 6 plej bonaj konkurantoj de ĉiu lando.

Interdistrikta 6-lukto.

Laŭ la rezultoj de internacia 6-lukto oni difinas la rangon de TUL distriktoj sumigante la poentojn de 10 plej bonaj konkurantoj de ĉiu TUL distrikto.

Intersocieta 6-lukto.

Laŭ la rezultoj de internacia 6-lukto oni difinas la rangon de TUL societoj kamparaj kaj urbaj sumigante la poentojn de 5 plej bonaj kamparanoj kaj 7 plej bonaj urbanoj.

Sistemkonkuro inter diversaj sangimnastiksistemoj.

La konkuro estas libera por 12—16-personaj gimnastiktrupoj viraj aŭ virinaj. La programo de ĉiu trupo estas tute nedevisa, nur la maksimuma tempo de elmonro estas limigita je 45 minutoj.

Specialaj prezentaĵoj.

Dum kaj post la gimnastikaj konkuroj oni rezervas tempon al ekster- kaj enlandaj trupoj por specialaj prezentaĵoj.

Kritiko.

En la individuaj kaj en la trupaj konkuroj oni kritikis ĉiun movserion per 1—20 poentoj je precizeco de duonaj punktoj.

Por la liber- aŭ por la bastonmovprogramo oni donas 1—40 poentojn. Je la dono de poentoj oni konsideras jenajn aferojn:

sanan efikon, belecon kaj elanĉecon de la programo, plenumanieron kaj la proporciecon de la trupo.

En la sistemkonkuro oni kritikas la prezentaĵojn de la trupoj per notoj: tre laŭdinda, laŭdinda, tre kontentiga, kontentiga kaj aprobobla. Je la dono de notoj oni konsideras a) sanan efikon, b) belmovecon kaj elanĉecon de la programo, c) plenumadon kaj d) ĝeneralan efikon.

Gejunuloj.

Knaboj sub 16 jaroj.

Trupa konkuro en libermovoj por minimume 8-knabaj TUL-trupoj.

La kunmeto de la programo estas nedevisa, sed la tempo de plenumado estas limigita maksimume je 25 minutoj.

La kritikado estas farota same kiel en la konkuro de liber- kaj bastonmovoj por viroj.

Knabinoj sub 16 jaroj.

Trupa konkuro en libermovoj por minimume 8-knabinaj TUL-trupoj.

La kunmeto de la programo estas nedevisa, sed la maksimuma plenumtempo estas 25 minutoj.

La kritikado estas farota same kiel en la trupaj gimnastik-konkuroj por virinoj.

KONKUROJ EN LA DROMA SPORTO.

Viroj.

Internaciaj individuaj konkuroj.

Kuroj je 100, 200, 400, 800, 1,500, 5,000 ja 10,000 metroj. Landvoja kurado je 25,000 metroj el kiuj la lastaj 2,000 metroj estos kurataj en la sportdromo. Barilkurado je 110 kaj 400 metroj.

Longsalto, altsalto, stangsalto kaj trisalto.

Kuglopuŝo (7.257 kg), diskoĵeto (2 kg), lanĉoĵeto (800 gr), martelĵeto (7.257 kg), pezilĵeto (17 kg) kaj lanĉpilkĵeto (2 kg).

5-lukto: (specoj en plenumordo) longsalto, lanĉoĵeto, kurado je 200 metroj, diskoĵeto kaj kurado je 1,500 metroj.

Por TUL knaboj sub 18 jaroj.

3-lukto (kurado je 100 metroj, longsalto kaj lanĉoĵeto).

Stafetkuradoj.

Je 4×100 kaj $800 + 200 + 200 + 400$ m interasocia.

Je 10×100 m inter TUL distriktoj.

Je 5×100 m por knaboj sub 16 jaroj, inter TUL societoj.

Je 5×100 m por knaboj sub 18 jaroj, inter TUL societoj.

Interdistrikta propaganda surstrata stafetkurado por 15-viraj trupoj, distanco proksimume po 500 metroj.

Trupaj konkuroj.

Ĉe la kurado je 5,000 m oni difinas la rangon de TUL distriktoj sumigante la tempon de 3 plej bonaj kurantoj de ĉiu distrikto.

Virinoj.

Internaciaj individuaj konkuroj.

Kurado je 100 kaj 200 metroj.

Longsalto kaj altsalto.

Kuglopuŝo (3.6 kg), diskoĵeto (1.250 kg) kaj lanĉoĵeto (500 gr).

3-lukto (kurado je 100 m, lanĉoĵeto kaj altsalto).

En la lukto oni difinas la rangon laŭ la proporciaj poentoj.

Rimarku! La ĵetoj estas plejbonmanaj.

Stafetoj.

Kurado je 4×100 metroj interasocia.

Kurado je 10×100 metroj inter TUL distriktoj.

Kurado je 4×100 metroj inter TUL societoj.

La konkuroj provizitaj per la signo TUL estas nur enlandaj.

PLENUMORDO DE DROMA SPORTO.

Vendredon la 17. 6. je la 11—14.

1) 100 m antaŭfazoj. 2) 100 m antaŭfazoj virinaj. 3) 200 m antaŭfazoj. 4) 110 m barilkurado antaŭfazoj. 5) 800 m antaŭfazoj. 6) 100 m mezfazoj. 7) Longsalto virina. 8) Longsalto. 9) Diskojeto. 10) 110 m barilkurado mezfazoj. 11) 100 m mezfazoj virinaj. 12) 5×100 m antaŭfazoj por knaboj sub 18 jaroj. 13) 200 m mezfazoj. 14) 5×100 m antaŭfazoj por knaboj sub 16 jaroj. 15) 200 m antaŭfazoj virinaj. Al finkonkuro laŭ tempoj. 16) 400 m barilkurado antaŭfazoj.

Vendredon la 17. 6. je la 17—19.30.

1) 200 m finkonkuro. 2) Kuglopuŝo. 3) Altsalto. 4) 10×100 m interdistrikta por virinoj. 5) 800 m finkonkuro. 6) Marteljeto. 7) Kuglopuŝo virina. 8) 5,000 m individua kaj trupa konkuro. 9) 400 m barilkurado finkonkuro. 10) 20 km surlandvoja ciklado. 11) Lanĉpilkjeto. 12) 200 m finkonkuro virina. 13) 5×100 m finkonkuro por knaboj sub 18 jaroj. 14) 4×100 m interesocia.

Sabaton la 18. 6. je la 11—14.

1) 80 km surlandvoja ciklado. 2) 110 m barilkurado finkonkuro. 3) 5-lukto. 4) 100 m de virina 3-lukto. 5) 400 m antaŭfazoj. 6) Lanĉojeto virina ankaŭ por 3-luktulinaj. 7) Altsalto virina ankaŭ por 3-luktulinaj. 8) 5×100 m finkonkuro por knaboj sub 16 jaroj. 9) 3-lukto por knaboj sub 18 jaroj. 10) Trisalto. 11) 4×100 m antaŭfazoj virinaj. 12) 400 m mezfazoj.

Sabaton la 18. 6. je la 17—19.30.

1) 100 m finkonkuro virina. 2) 200 m finkonkuro. 3) Stangsalto. 4) Peziljeto. 5) Diskojeto virina. 6) 25 km surlandvoja kurado. 7) 1,500 m kurado. 8) Lanĉojeto. 9) 4×100 m finkonkuro virina. 10) 400 m finkonkuro. 11) 10,000 m kurado. 12) 10×100 m interdistrikta. 13) 4×100 m interesocia virina. 14) 800+200+200+400 m interesocia.

NAĜKONKUROJ.

Por viroj.

Internaciaj konkuroj.

100 kaj 1,000 m per libera maniero, 100 m surdorsa naĝado, 400 m brustnaĝado, rektaj saltoj el etaĝoj, variaj saltoj el etaĝoj, variaj saltoj de svingtabulo.

4×100 m stafetnaĝado inter TUL societoj.

Rektaj saltoj el etaĝoj por TUL knaboj sub 16 jaroj.

Por virinoj.

Internaciaj konkuroj.

100 m naĝado per libera maniero, 100 m brustnaĝado, rektaj saltoj el etaĝoj kaj variaj saltoj de svingtabulo.

4×100 m stafetnaĝado inter TUL societoj.

PLENUMORDO DE NAĜKONKUROJ.

Vendredon la 17. 6. je la 15.

1) 100 m libera naĝado virina antaŭfazo. 2) 100 m libera naĝado vira antaŭfazo. 3) variaj saltoj de svingtabulo. 4) devigaj saltoj viraj. 5) 100 brustnaĝado virina antaŭfazo. 6) variaj saltoj de svingtabulo. 7) devigaj saltoj virinaj. 8) 4×100 m stafetnaĝado per libera maniero vira. 9) rektaj saltoj el etaĝoj por viroj. 10) rektaj saltoj el etaĝoj por knaboj. 11) 400 m brustnaĝado vira antaŭfazo. 12) 100 m libera naĝado virina finkonkuro. 13) 1,000 m libera naĝado vira. 14) variaj saltoj de svingtabulo. 15) nedevigaj saltoj por viroj. 16) 100 m surdorsa naĝado vira. 17) akvopilko antaŭfazoj.

Sabaton la 18. 6. je la 14.

1) 100 m brustnaĝado virina finkonkuro. 2) rektaj saltoj el etaĝoj por virinoj. 3) variaj saltoj el etaĝoj. 4) devigaj saltoj por viroj. 5) 100 m libera naĝado vira finkonkuro. 6) 4×100 m liberstafeto virina. 7) 400 m brustnaĝado vira finkonkuro. 8) variaj saltoj de svingtabulo. 9) nedevigaj saltoj por virinoj. 10) variaj saltoj el etaĝoj. 11) nedevigaj saltoj por viroj. 12)

finkonkuro en akvopilko. 13) 100 m surdorsa naĝado vira finkonkuro.

Devigaj variaj saltoj el etaĝoj: 3 saltoj el 5 m etaĝo, germana salto, volto kankre, unu kaj duono volto antaŭen, 3 saltoj laŭ propra elekto.

Devigaj saltoj de svingtabulo: rekta salto elanĉa, volto kankre, unu kaj duono volto antaŭen, 3 saltoj laŭ propra elekto.

LUKTOKONKUROJ.

Oni konkuras en 7 serioj jene: sub 53, 58, 62, 67.5, 75, 82.5 kaj super 82.5 kg.

Luktotempo estas 10+10 minutoj kun unu minuta intertempo. Oni eksludas el la konkuro 1) post du malvenkoj, 2) post unu malvenko kaj du sensolvaj luktoj aŭ 3) post kvar sensolvaj luktoj.

BOKSOKONKUROJ.

Oni konkuras en 8 serioj jene: sub 50.5, 53.5, 57.5, 61.5, 66.5, 72.5, 79.5 kaj super 79.5 kg.

Boksotempo estas 3+3+3 minutoj kun unu minuta intertempo. Se oni ne akiras la solvon en ordinaraj fazoj, oni povas ordigi maksimume du eksterordinarajn fazojn po du minutoj.

CIKLOKONKUROJ.

Oni konkuras je 20 kaj 80 km. La vojo de 80 km ciklado estas 40 km longa kaj oni veturas ĝin du foje. La ekveturo okazos je intertempoj de duono minuto.

LUDOJ.

Piedpilko, akvopilko kaj por TUL virinoj limpilko.

Piedpilko kaj akvopilko estas interesaciaj. La limpilko estas inter TUL societa kaj oni eksludas la trupon el la ludo post unu malvenko. Laŭ tio se la tempo sufiĉas oni aranĝas konsolkonkurojn.